

PUBLIC LIBRARY
30 NOV 1921
OF VICTORIA

La Suda Krucó

Oficiala Organo de la Australasian Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penceoj aŭ 2 respondkuponoj.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 17. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Novembro, 1921.

Esperanto and the League of Nations.

The League of Nations, during its session on 15th September, at the request of delegates from 13 states, decided to place on the agenda for the 1922 sittings the question of teaching Esperanto in public schools. In the meantime it has instructed the staff to prepare a full report, supported by documentary evidence, showing the results already attained in the schools of the various countries which have to a greater or lesser degree introduced the teaching of Esperanto into their schools.

Another Esperanto Success.

At its first international congress, held in Geneva from 1st to 10th September, the International League for the Defence of Peoples' Rights decided that "the official languages of the League and of its universal congresses shall be French and the neutral help language, Esperanto." The official organ of the league will publish an Esperanto epitome of all important articles appearing therein. The league will establish an Esperanto office. The congress requested the League of Nations to recommend to its members, as soon as possible, the gradual introduction of Esperanto into the schools, so as to facilitate direct communication between the peoples of all nations and

the control by them of international affairs. (The League for the Defence of Peoples' Rights is an organisation to watch the interests of the small nations).

Our Chief Officers.

The results of the ballot for the chief officers of the Australasian Esperanto Association have been announced.

Mr. T. E. O'Donoghue, Sydney, is President.

Mr. J. Joliffe, Sydney, Mr. E. A. Pryke, Barraba, and Mr. A. R. Cohen, Melbourne, are Vice-Presidents.

All these samideanoj are enthusiastic workers, and their selection for these important offices will give general satisfaction.

Kroniko.

Greymouth, Nov-Zelando. — En tagjurnalo "Grey River Argus" aperis bona kolekto da faktoj pri Esperanto kaj ankaŭ alvoko subteni la Suda-Krucó'n. Imitinda ekzemplo!

Melburno, Vic. — Multaj lernantoj studadas diligente. Meznombre kvindek samideanoj ĉeestas la kunidojn ĉiun semajnon. Unu grupo sin preparas por Ekzameno por B.E.A. diplomo. La Suda-Krucó Traduka Rondo nun havas pli ol kvardek rondanojn.

Gisborne, Nov-Zelando. — La anoj kunvenas ĉiujande. S-ro J. L. King, 42 Stanley Road, donos ĉiujn necesajn informojn.

Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio al la XIIIa Kongreso.

(Daŭrigo).

Nur du aŭ tri semajnojn poste, la 12 de Junio 1921, mi ricevis petskribon, regule subskribitan de kvin L. K-anoj pri la io-demando. Ĝin mi senprokraste transdonis al la Akademianoj por atenta ekzameno, sed, plilarĝigante la demandon, mi komisiis al S-ro Grosjean Maupin, Direktoro por la Komuna Vortaro, la pezan taskon verki pri tiu ĉi demando, raporton pure objektivan, science metodan kaj pruve plenan, konsiderante ĉiuflanke kaj en ĝia tuteco la malfacilan kaj malsimplan problemon, profitante kaj kompletigante la antaŭajn partajn raportojn jam publikigitajn.

Petskribon pri tiu ĉi sama demando mi ankaŭ ricevis de S-roj Rollet de L'Isle, Prezidanto de la Franca Societo por la propagando de Esperanto, J.-M. Warden, Prezidanto de la Brita Esperanto Asocio, A.J. Witteryck, Prezidanto da la Belga Ligo Esperantista, D-ro A. Stece, Prezidanto de la Germana Esperantista Ligo kaj aliaj. Dezirante, ke finiĝu, kiel eble plej baldaŭ la bedaŭrinda konflikto, ili proponas solvon akceptindan de ambaŭ partioj t. e. la uzon de **lando** (Germanlando k. t. p.), kiu estas tute Fundamenta kaj rajtas esti uzata apud la Fundamenta, regula formo **ujo**. Mi respondis:

"Kiel Prezidanto mi tuj rajtas respondi al vi, — ĉar neniam alia respondo estas ebla, — ke la Akademio nur povas konsili al ĉiuj la uzon de la Fundamenta finiĝo **ujo**, sed ke, aliparte, ĝi tute ne povas mal-konsili la uzon de **lando**, kiel sufikso, ĉar tia uzo, kiel vi mem rimarkas, estas plene regula kaj laŭfundamenta."

Kaj nun mi firme esperas, ke ĉiuj Esperantistoj, komprenante la dangeron de konfliktoj kaj de nesufiĉe pripensitaj decidoj, konsente kaj propravole restos, ĝis definitiva, pravigita solvo de la problemoj, simple fidelaj, en la praktiko, al la Fundamento kaj al la Zamenhofa kaj tradicia uzado, ne **enkondukante** novan sufikson kaj profitante la

diversajn nun ekzistantajn kaj permesitajn rimedojn. — La Akademio celas nur la pacon kaj akompluti necesajn al la bono de komuna afero. Eble ĝia Prezidanto en tiu ĉi afero, kelkfoje eraris sia konduto . . . sed ĉu ĉiuj alportu al li la necesan, eĉ en kontraŭamikan helpon? Ili de nun alportu ĝin, kaj ili povas esti certaj, ke ĉi flanke ne mankos la bonvola samideana ĝentileco.

La sekcio por Komuna Vortaro bone laboris. S-ro Grosjean-Maupin sendis al la L. K-anoj tre zorgemulan paritan liston, kiu postulis de grandan laboron. Ĉar la voĉdona finiĝos nur la 15 de julio, mi posttie ĉi nur anonci la reporton, kiun legos en la kunsido de la Lingva Komitato.

Por la Teknika Vortaro, D-ro Cret ankaŭ laboris siaflanke. La duan cirkuleron pri la organizo de laboro en diversaj subkomisionoj konigos ankaŭ tie.

De la sekcioj por Gramatiko kaj por Konkursoj mi ne ricevis raportojn, sed kulpaj ne estas iliaj Direktoroj, ĉar, ricevinte neniumandon specialan por la Gramatiko (escepte pri la akuzativa problemoj kies solvon jam antaŭe studis S-ro Grosjean-Maupin kaj pri kiu respondo estis urĝa), nek librojn premiajn, mi ne petis raportojn de la Direktoroj: se malprave, pardonu! . . .

Mi esperas, ke en Praha ni tute ĝentile, tute amike esploros la gravan problemon de reorganizo de la Lingvaj Institucioj, kaj poste, antaŭ la fino de l' jaro, ni havos sufiĉajn dokumentojn por verki plenan reporton ekzaminotan kaj aprobotan de la Lingva Komitato antaŭ la estonta Kongreso.

Permesu, karaj samideanoj, la finante tiun ĉi jam tro longan reporton, . . . mi rediru kun insisteco ke nia interna unueco estas la ĉefa kondiĉo de nia sukceso. Se tiu energie, tiel obstine ni defendas la pure Zamenhofan lingvon, tio estas, ĉar ni opinias ĝin en ĉi detalaj la plej bona: ne fanatike estas nia fideleco, sed ĉar ni scias, ke nur per tia sintenado ni povas konservi la unuecon ĉu internacian, ĉu interklasan, ĉu interaĝan. El lingva

vidpunkto ne ekzistas, ne devas ekzisti inter ni diversnacianoj, diversklasaj homoj, diversaĝuloj: ni ĉiuj estas Esperantistoj, nur Esperantistoj. Ni neniam starigu nacion kontraŭ nacio, klason kontraŭ klaso, aĝon kontraŭ aĝo, sed unuanime, manon en mano, ni laboru por la venko de la kara lingvo, kiun donis al ni nia neforgesebla Majstro, D-ro Zamenhof!

Th. Cart.

Prezidanto de la Lingva Komitato.
Parizo, la 10 de Julio 1921. —

Here and There.

Some idea of the rapid progress of Esperanto may be gained from the statistics of Esperantista Laboristo and Esperanto Triumfonta, both of which are now issuing and selling editions of 2500 or over and are on a firm financial basis.

The Bulgarian parliament has adopted the bill of the Ministry of Public Instruction introducing Esperanto as an elective study in Bulgarian high schools for the year 1921-22.

The annual report of the Estona Esperanto Association announces that more than 300 people attended classes during the year. The Tuesday classes in Tallinn had an attendance of 40 to 60. Groups meet in Haapsalu, Narva, Tartu and Voru. The scholars of the secondary school at Vaeke-Maarja learn Esperanto.

Esperanto is now a subject at the International University, Brussels.

Gaston Messenger, an Esperantist in Montreux, Switzerland, and proprietor of the International Spice Mart, is giving two per cent. of his daily takings to the Russian Famine relief fund. A practical application of the Esperanto ideal!

The Third congress of the World Brotherhood decided that correspondence of non-English speaking lands with the chief office shall be conducted in Esperanto. It also recommended the formation of Esperanto groups in the branches of the World Brotherhood in all countries.

The association of Brazilian Engineers has decided to support the use of Esperanto in technical circles.

Poluj' al Ĉeĥoslovakio.

Potence sonu mia liro,
Agordu ĉiuj koroj tuj...
Ĉar estas festo, estas miro,
En nia land' — Esperantuj'!...
Unue sur la kampo nia
Fratin' aliras al fratin'
Pola al Ĉeĥoslovakia —
Starintaj ambaŭ el ruin'...

Unue post centjar'-turmento
Al si denove ambaŭ jen
Etendas manojn kun fratsento —
Kaj vidu! — manojn sen katen'!...
Lazaroj du — el tomb' vokitaj
Ekstaras kun batanta kor',
Kun manoj forte elstreĉitaj
Al nova sent' — al nova glor'...

Alinacia ĥor' fratina
Samideana nia ar',
Salutas ambaŭ am-inklina
Ĉe la komuna lingv'-altar'...
Mastrino Ĉeĥa! Vin salutas
Gastino Pola per ĉi-kant'...
Per floroj ambaŭ superŭtas
La verda arb' de l'Esperant'!

Filinoj nove vivigitaj
Starigos forte sur la gard'
Kun la aliaj jam ligitaj
Sub la eterna verd'-standard'!...
Leo Belmont en "Nova Eŭropo."
Julio 1921.

Esperantistaj Skoltoj.

Skoltoj esperantistaj bonvole notu ke la adreso de la nova sekretario de la Skolta Esperantista Ligo, al kiu oni devas sendi ĉiujn komunikadojn pri skoltaferoj esperantistaj estas, Norman Booth, Netherton, Huddersfield, Anglujo.

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, n-ro 5.
Arguso, Apartado No. 10-100, Mexico, D.F., Aĝeros monate, abono unu dolaro, n-ro 1. Ĉeĥoslovaka Gazeto, kaj Nova Eŭropo), n-ro 3-4. La Dektria, aĝeros monate dum kvin monatoj, eldonita de la Loka Kongresa Komitato, Praha 111, Nerudova 40; n-roj 1, 2. Esperanto Triumfonta, n-roj 49, 50. Kataluna Esperantisto, n-ro 9. Libero, Kioto, n-ro 10-11. Literaturo, n-ro 11. L'Esperantisto, n-ro 8. Le Monde Esperantiste, n-ro 4. Verda Utopio, n-ro 9. Verda Ombro, n-ro 8.

Kostumbalo en Melburno.

Ĉu estis pro tio, ke la dato estis la 13a, aŭ pro tio, ke la kuraĝo de kelkaj Esperantistoj ne elportas du balojn en unu jaro, aŭ pro tio, ke preskaŭ ĉiuj Esperantistoj postulas de la sorto nur tempon por seninterrompa studado, ke, ĉe la balo en Gregory Hall, Windsor, la 13an de oktobro, almenaŭ duono de la ĉeestantaro estis neesperantista?

Certe, ke multajn fremdulojn la balo allogis ne estas kaŭzo por plendo, sed bedaŭrinde estas, ke la granda amaso da Esperantistoj, kiun Melburno kaj ĉirkaŭaĵo povas kunigi, ne estis tie por profitigi la movadon per tia bona okazo por propagando.

Tamen, krom la manko de sufiĉe esperantista atmosfero, la balo estis tre kontentiga. Graciaj formoj, belaj vestoj, naciaj kaj frakaj, bonega muziko, rozkoloraj lumoj, verdaj palmoj, ridetoj, babiladoj (ĉu koketadoj?) delikata vespermango, kaj la certa sento ke ĉio funkcias perfekte faris feliĉegan scenon por tiuj, kiuj arangis la balon; kaj por la nelacigeblaj ĝejunulaj piedoj instigitaj al ĝoja dancado la dua matene alvenis tro rapide. Post ĉio ĉi, kiu plendos pro malgranda ŝuldo de £2? Du funtoj por tia reklamo — tre malmulte kosta!

C'e Rotorua, Nov-Zelando.

Neniam oni povas forgesi la unuan viziton ĉe Rotorua pro tio, ke laodoro bonvenigante iun estas la malbonodoro de putrigintaj ovoj. Post kelke da tagoj oni pli malpli alkutimiĝas al tiu sulfuraodoro, sed tio ĉiam ĉeestas kaj plifortigas post pluvo.

Tagmaĝinte mi vagis en la registraran parkon. Belaj herbejoj, florantaj arbustoj, bandomoj, tedomo, laŭtenisejoj kaj lignapilkejoj tie troviĝas; sed la ĉefaj altiraĵoj estas la lagoj de bolantaj koto kaj akvo. Mi esploris tiun, kiu sin ŝajnigas fonto, sed efektive estas ĝejsereto de bolanta akvo, havanta anasojn naĝantajn sur, kaj lagflorojn kreskantajn en la malvarma akvo en la sama baseno.

Oni sin banas en specialaj banejoj kaj trinkas la akvon por kuraci diversajn malsanojn. Ĉar mi ne havis definitan malsanon mi provis ĉiun banon. La "Rachel" naĝbanejo

estas la plej alloga, tiu sentiga haŭton kvazaŭ veluro. Pro tio estas malpermesate, ke oni vestu plie ol per nura banĉapo, oni bezonas da kuraĝo por sin regali per publikaj banadoj. Aliaj banejoj estas la "Priest," la "Postmaster," la "Radium" kaj la "Spout."

Kiam iu ĉirkaŭpromenas, tiu ekaŭ averтата, "Ne forlasu la vojetojn. Posedante esploreman inklino flankeniris, sed post kelkaj ekmomokazaĵoj mi decidis marŝi laŭlonge la rekta kaj mallarga vojeto. Ĉe la certa flanken paŝi rezultus en per pri kiu avertis la gluk-glukado de fluida koto kaj la siblado de bolanta akvo sub la piedoj.

La indiĝena vilaĝo, "Whakarewarewa," konstruita inter la ĝejseroj estas tre alloga loko pro ĝiaj maoriaj "Pah," (malnova fortikaĵo), kaj la vena domo kaj kabanoj. La virinoj kun siaj beletaj infanoj pendantaj sur siaj dorsoj, kaj salutante unu alian per dolĉaj, belsonaj voĉoj; malgrandaj knaboj, proponante sidi sub la akvon por pencoj kaj prezoj la "hakan" por unu penco; la junuloj kaj haroj; la domistinoj kuirantaj la manĝaĵojn en la bolantaj lagetoj neĝenate de la karblaboristaj strioj — faras pentrindan bildon de kvazaŭ fremda lando. Sed la superaj gloraĵoj estas "Pohutu" (ĝejseroj) kiam ĝi bonvolas ŝpruci. Tutaj semajonoj mi atendis la spektaklon post tio estis pluvo dum kvar tagoj kaj tiam la ĝejseroj ŝprucis kvarojn antaŭ la matenmanga horo. Post ĝi sin prezentis ĉiun tagon post tagmeze kaj vespere. La antaŭpreparado estas tre interesa; la "Prince of Wales Feathers" ŝprucas pli kaj pli alten, la kaldrono bolas kaj muĝas, pli kaj pli koleriĝante estas atingita la limo de elporteblo, tiam ĝi subite ekŝprucas ĝis alteco de kvardek futoj; spektaklo plej inspira kaj atendinda.

"Ohinemutu," alia vilaĝo apud la lago, posedas tre interesan indiĝenan preĝejon kaj paroladejon kun bonegaj matoj kaj lignaj skulptaĵoj.

Trege mi ĝuis koncerton de la maorioj, kiuj laŭnature estas aktoroj kun bonegaj voĉoj por kantado. La legendo pri "Hinemoa" estis prezentata per serio de teatraĵoj kaj graciaj "Poi" dancoj de la fraŭlino kaj la furioza "haka" de la viro ravis kaj tratremigis min.

Komuna Intereso.

Verkis Matildo Direktilo.

"Jen mi estas en ĉi tiu granda urbeĝo, venkite en serĉo por unu loketo, kie mi povus manĝi lunĉeton, ne rigardate fikse aŭ ordonate ne tion fari."

Laŭ diversaj manieroj, Anastasia Lang esprimis tion al si en la daŭro de dek tedaj minutoj, dum kiuj ŝi ŝajne legis libron en la Melburna Publika Biblioteko, sed vere rigardis sopire brunpaperan saketon sur siaj genuoj.

"Mi morte malsatas," ŝi diris al si la centan fojon. "Estas mortige esti sen ofico."

Neniu, rigardante Anastasia, imagus, ke ŝiaj pensoj povus esti tiaj, tiel malakordaj kun ŝia aspekto, kiu estis prospera kaj deca ĝis detalo. Ŝia nigre blua, tajlorfarita kostumo estis el la plej bonaj, kiujn Melburno povis cedi; kaj, kvankam postulema plej altgrade, ŝi kontentiĝis je ĝi. Ŝia nigra, velura ĉapelo estis la plej moda el lastmodaj, kaj ŝiaj nigraj gantoj kaj ŝuoj estis la plejsupro de perfekte. Por koloro, ŝi havis realan, varman, sanan sangon en siaj vangoj, sen tuŝeto de pudro aŭ ruĝilo, kaj blujn okulojn, pli blujaj pro la ondoj de nigraj haroj trans ŝia frunto. Ja, entute, Anastasia aspektis tre malproksime de malsato, kaj preskaŭ frenezeco pro manko de nutrado por ankoraŭ alia semajno.

Ŝi havis dudek tri jarojn. Dum ses jaroj ŝi estis dungata kiel stenografiistino de firmo, kies administranto tiel multe aprobis ŝian aspekton, kiam li la unuan fojon vidis ŝin, ke li decidis akcepti ŝin malgraŭ la kvalito de ŝia laboro. Tiam, ĵus veninte de komerca lernejo, ŝi faris ŝian laboron sufiĉe bone; sed, eltrovinte, ke la komizoj inklinis dorloti ŝin, kaj ke la administranto atendis preskaŭ nenion krom bele-tajn ridetojn de si, Anastasia permesis al la cirkonstancoj tiel kontroli ŝin, ke, je la fino de ses jaroj, ŝi trovis sin tre nekompetenta laŭ sia aĝo, kun ŝanco edziniĝi kun la administranto aŭ preskaŭ iu ajn viro de la stabo, kun milito inter ŝi kaj ĉiuj aliaj virinoj de la oficistaro, kun nenia parenco aŭ amikino en la mondo, kaj kun ŝia intereso vere viva por nur unu viro, kiu ŝajne nur toleris ŝin laŭ larganima, sindonema

maniero. Aferoj estis por Anastasia en ĉi tiu stato, kiam, kun rompiganta subito, kiu kaŭzis al ili ĉiuj froti la okulojn por vidi ĉu ili suferis inkubon aŭ ne, la firmo bankrotis.

Anastasia estis gajninta pli bonan salajron ol ordinare por stenografiistino kaj elspezinta ĝin, kiel povas nur virinoj, kiuj supozas ke la fortune estas neŝanceligema. Kun neniu, al kiu ŝi sentis, ke ŝi havis rajton sin turni, kaj kun tre malmulte da mono, ŝi eliris el la pereigita firmo kun rifuzo edziniĝi kun la administranto sur siaj lipoj, kaj kun koro plena da fido en sia vizaĝo por estonta helpilo.

Tamen, iel, ŝi ne povis konvinki la malmolkorajn homojn al kiuj ŝi jam sin turnis, konsideri ŝian belecon iel necesa por prosperigi siajn negocojn. Ŝi certe ne klopodis sugestii tion, sed ŝi tenis esperon, ke, kiam homo vidus ŝin, li tuj akceptus, ŝin kiel ornamajon kaj gajigilon por la firmo. Anastasia tute ne estis aventurino, nature, sed, malbonokaze, ĝuste je la komenco de ŝia enspeziginta kariero, la cirkonstancoj donis al ŝi la impreson, ke ŝia vizaĝo estas ŝia plej bona rekomendilo.

Post tri semajnoj de nefrukta serĉado, ŝi trovis, ke ŝia memfido komencis forlasi ŝin. La ĉagreno de malsukceso, lacigege marŝado kaj malbona nutrado renversis ŝian opinion pri ŝi mem en la rolo de aldone al iu ajn oficistaro.

En la dua semajno, ŝi eliris el ŝia luksa pensio por preni malmulte koston ĉambron en Suda Melburno. Pano, butero kaj teo estis ŝia nutraĵo kun buloj de sukerpano meztage, kiam ŝi ĉiam tiris sin al publika ĝardeno, kie, en kiel eble plej kaŝita loko, ŝi englutis ŝian manĝaĵon.

En la unua kaj dua semajnoj, ŝi kontentiĝis respondante anoncojn por stenografiistinoj dungotaj, sed, en la sekvanta semajno, ŝi ankoraŭ faris petojn ĉe prospere aspektaj oficejoj.

Post ĉio ĉi peno, ŝajnis, ke ŝi akiros oficon ĉe podetala vendisto, kiu havis subite superabundon da laboro, kiu ŝajne daŭros dum multe da monatoj. La salajro proponita estis la nura minimumo fiksita de la registaro, sed vere tiel multe kiel ŝi valoras, ŝi konvinkigis, kaj sufiĉe por reteni la animon en la korpo per iom

da baraktado. Estis alternativo por ŝi, akcepti laboron, kiun ŝi malrapide estis trovanta, de la vidpunkto de la digno, preskaŭ tiel dezirinda kiel stenografiado en oficejo, kie ŝi devus fari veran taskon, ne esti dorlotita, kaj teni sian lokon de subulino, kiam nelogataj administrantoj enirus la oficejon. La alternativo certe enhavus eblojn de indigindaĵoj, kiujn versajne stenografistoj neniam renkontas, sed ĝi, donus pli grandan monrekompencan kaj la certan de deca loĝejo. Tamen, pro la malfacile mortanta tradicio kiu persistas malhonorsigni la plej necesajn servojn al la homoj kiel malsuperaĵoj, kaj tiujn, kiuj konsentas fari ilin, malalkastajn, Anastasia, timante perdi sian staton de kutima digno, hezitis praktiki sian nove trovitan kredon en la digno de ĉiu bona servado.

Je la kvarono antaŭ la sesa, ŝi vizitis la oficejon de la podetala vendisto, kaj informiĝis, ke li ne povis honori sian aranĝon kun ŝi tiam, sed li ricevos ŝin je la sepa akurate. Anastasia estis tro piedlaca kaj malsata por marŝi al sia ĉambro kaj returnen dum la tempo permesita, kaj ŝi ne volis malŝpari tranmonon. Ŝi aĉetis kelke da buloj de sukerpano, kaj, ĉar estis vintra vespero kaj tro mallume por esti sendanĝere en la ĝardenoj, ŝi ekiris por atingi kreskajejon en iu granda negoĉejo, kie ŝi ofte vidis en la estinteco personojn tiel lacaj kaj malsataj kiel ŝi, prenantaj refresigilojn aĉetitajn aliloke, kaj, ŝajnigantaj intereson en la birdoj enkaĝitaj tie. Ŝi ne estis vizitinta tiun magazenon de post multe da monatoj. Kiam ŝi alvenis, kaj trovis, ke la kreskajejo, kiu estis tie dum multe da jaroj, estis jam for kvazaŭ ĝi neniam ekzistis, kaj kiam, kun la fakto rigardanta ŝin, ŝi certigis, ke ne estis en tuta la granda urbo loketo

kie ŝi povus sidigi kun ia ajn sa de digno kaj manĝi siajn bulojn senpage, la larmoj ekrapidis al ŝiaj okuloj.

"La avaraj senkompatantoj," diris kun venĝemo kontraŭ la nova administrado; sed pli bonkoraj senvenintaj al ŝi el multe de lastatemaj korseĉado, rapide ree kontrolis kaj ŝi pensis kun lacega rezigno: "Kiu povus kulpigi ilin? Kial mi provizus sidejon por personoj, kiuj, kiuj nur malordigus la lokon per manĝpecetoj, kaj kiuj neniam elspezus pencon kie ili manĝus? komercado estas la komercado. mi ne estus estinta tia spionensorbinta ĉion, kion mi povis redonanta preskaŭ nenion, mi estus posedanta nuntempe bone laborebla cerbon, taŭga por la laborvendeanstataŭe, mi havas malsatvizagon, sufiĉe bona nur por aliaj administrantoj, kiu fuŝis sin en negocon.

Maljuna viro portanta saken similan al tio de Anastasia staris ŝia kuboto observante ŝian malkontentigitan rigardon.

"Jes, fraŭlino, tio estas tio, kion mi faris," li diris vundite, kapbalancante kontraŭ la vicoj de vendbenkoj, kiuj staris en la lokoj de la forigitaj kreskajoj kaj sidbenkoj. "Estis preskaŭ jaro de kiam mi povis ĉirkaŭvagi, kaj tuj kiam mi revenis al miaj malgrandaj ĝojoj en la urbejo, ĉi tion mi trovas antaŭ mi."

Li skuis la kapon melankolialdonante, "Mi ne ŝatas vidi miajn novajn instituciojn forbalaitajn tion mi ne ŝatas."

"Ni ne havas rajton sur ili," Anastasia respondis; apenaŭ konsolita ke ŝi sin klinis al diskutado de afero kun tiu malbone vestita, maljuna forlasito de la fortuno.

Kuraĝigite, li ŝanĝis sian tonon al intima kompato: "Ne havas oficon"

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facilaj por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Anastasia estis tro laca, malsata kaj humiligita por indigniĝi pro la familiareco. Ŝi kapbalancis jese. "Pensis tion, li diris. Malbona tempo. Sed vi estas tre bonaspekta. Iru al la Lernejo de la Artoj. Oni prenis vin kiel modelon. Tie estis la loko, kien la venkitoj iras."

Li finiĝis per scia, ŝercema ridetaĉo, kiu veniĝis larmojn al la okuloj de Anastasia, tro humiligitaj por elŭti indignon. Tio ne estis pro tio, ke Bohemujo ne allogis ŝin, sed pro tio, ke tiu maljuna vagulo, vidante tra la belajn vestojn rekte ĝis la svenanta koro kaj mordanta malsato de ŝi, ne nur konsideris ŝin objekto de kompatego, sed eĉ katologis ŝin kun tiuj, kiuj ne povas preni sian sorton en la propraj manoj sed permesas al si esti tio, kion la cirkonstancoj volas. Tiam ŝi ekkonvinkiĝis, ke tio estis ne malpli ol ŝi estis farinta en ses jaroj, dum ŝi trovis la tuŝojn de la cirkonstancoj molaj kaj karesaj; kaj tuj ŝi sentis sin instigita montri al iu, kiu ajn, eĉ tiu malestiminda nelaborulo, ke ŝi estas viva virino direktanta sian propran vivon.

"Dankon, ŝi diris, sed vi eraris."

"Okaze ke mi ne eraris," li respondis kun ridetaĉo pli scia ol la unua, "ĝi estas en la Publika Biblioteko-Konstruaĵo — la Lernejo de la Artoj."

Anastasia forrapidis, konscia pri subita ruĝiĝo kaj la ekrigardoj de la vendistinoj kaj aĉetantoj, sed tra ŝia embaraso, kaj pli forta ol ĝi, venis espero, kun la vortoj de la maljunulo, ke en la biblioteko ŝi trovos angulon kie ŝi povos ŝtele enmeti iom da nutraĵo en sian buŝon.

Tie, kun kelke da libroj amasigitaj antaŭ ŝi, kaj siaj okuloj direktataj al la homo sur la estrado meze de la ronda ĉambro, ŝi avare rigardadis por ŝanĉo malfermi sian saketon. Ŝajnis al ŝi, ke ĉiuj suspektoj de la homo sur la estrado koncentriĝis sur ŝin, kaj ke li povis vidi eĉ malsupren kien la musoj enŝtelus en tian allogan silenton, se ne ekzistus li kaj kelkaj aliaj similaj al li, kiuj aperis de tempo al tempo, el nenie, ŝajne, sed ĉiam ĝuste tiam, kiam ŝi estis malfermonta la bulan saketon. Kaj kiel laŭte la papera saketo sursuris, elvokante plendemajn eĥojn de la ekkolerema silento! Je ĉiu peno, kiun ŝi faris por elpreni pecon da

sukerpano, Anastasia atendis vidi kaŭrantajn, sovaĝbestajn oficistojn, elirintaj el kaŝitaj nestegoj, furioze atakantaj helpitaj de koleraj patronoj de la biblioteko, kontraŭbalantaj ŝin kun venĝo en la okuloj kaj minaco en la ungegoj, pro tio, ke ŝi interrompis la pacon per tiaj orelfendigaj bruoj. La tempo estis pasanta, ankaŭ, ŝi sentis al si, kaj sen nutraĵo ŝi ne havus sufiĉan kuraĝon por la intervjuo je la sepa.

Ŝi leviĝis esperante trovi ombron ekstere, kie ŝi povus nerigardate, preni sian manĝaĵon. Ĉe la pordo, starante en la brilego de la elektraj lumoj, kaj rigardante en la lumon de alta luno, ŝajnis al ŝi, ke la dua kolono en la dekstro de la antaŭkolonaro jetis ombron perfekta, por ŝia celo. Tie ŝi starigis, malfermis sian saketon kaj komencis manĝegi siajn bulojn. Ŝi spertis mirindan senŝarĝiĝon, sekuron kaj saton kiam, kun akra apetito, ŝi estis fine manĝanta sian sukerpanon. En ŝia granda ĝuo, ŝi sentis sin tiel kontenta, kiel Juno trinketante ambrozion sur nubo kaj ĝojante en la fakto, ke ŝi povas malsupren rigardi preterpasantajn mortemulojn, kiuj divenas nek kiel ili estas observataj, nek kiel iliaj venado kaj forirado aldonas amuzon al ŝia festeno.

(Daŭrigota).

Al Niaj Subtenantoj.

Ni dankas niajn subtenantojn por la kuraĝigaj leteroj, kiujn ni ne povas persone respondi kaj ankaŭ por la donacoj kiuj nin multe helpas. Kelkaj abonantoj ankoraŭ ne renovigis siajn abonojn. Ni urĝe petas ke ili tuj tion faru. Ni ricevis la jenajn sumojn kun danko: U. Usami, Geneve, 4/-; A. Zimmermann, Chillagoe, 4/6; G. J. Jansen, Eudunda, 4/6; J. H. Tate, Rabaul, 4/6; R. W. Jay, Murwillumbah, 9/6; M. R. Cederman, N.Z., 10/-; E. H. Dawson, N.Z., 6/6; C. Kidd, £4/1/6; J. E. Dixon, N.Z., 5/-; G. Bolden, Qld., 4/6; G. H. Chappell, 4/6; G. D. Kvarrestrom, 4/6; S. Corrigan, 4/6; W. Webb, Torrita, 4/6; A. Auwart, 3/10; D. Henderson, N.Z., 4/6; J. Belsack, Qld., 9/-; J. P. Bennett, N.S.W., 4/6; G. Benson, S.A., 4/6; S. Trewin, 4/6; W. Macdonald, 4/6; J. T. E. Hinkel, U.S.A., 1/-.

"The Esperanto Guide."

Translation of the Exercises.

Exercise 22.—Fluanta aŭ staranta akvo estas tre necesa por bestoj. Fluante, ĉi tiu akvo gajigas nin per sia dolca murmuro. Mi vidas la fluantan akvon. Kiam vi instruas min, mi estas la instruato kaj vi estas la instruanto. La homo, kiu estas elpelita (or: kiun oni elpelis) estas nomata elpelito. Ni konas la tempon estantan, sed neniu konas la tempon estontan, kaj ni povas uzi nur la tempon estantan. Kio okazis al vi? Hieraŭ vespere, marŝante sur la strato, mi falis antaŭ mia domo kaj de tiu tempo (or: de tiam) mi ne povas marŝi. La mensoganto kaj la mensoginto ambaŭ meritas riproĉon. La nomo "Esperanto" devenas de tio, ke doktoro Zamenhof eldonis sian unuan libron sub la nomo "doktoro Esperanto." Mono havata estas pli bona, ol mono havita. Kial vi venas neatendite? La mangintoj prenis siajn ĉapelojn kaj eliris.

Exercise 40.—La pafado daŭris tri horojn, kaj la pafoj fariĝis pli kaj pli (or: ĉiam pli) oftaj. La fumado, la kuracistoj diras, malhelpas la kreskadon de la infanoj. Mi eksaltis de surprizo, kiam mi vidis lin eniranta. Tiam li komencis riproĉi min, ke mi ne atendis lin ĉe la stacidomo. Li kantas de mateno ĝis vespero. Kiu estas lia okupo? Li okupas sin per pentrado. La policano eksciis per demandado, ke la ŝtelisto ne estas vidita en la vilaĝo dum la pasintaj tri monatoj. La knabo komencis sian lecionon, sed ne havis sufiĉan tempon por ellerni ĝin. Pasigu (or: donu) la sukerujon al via amiko. La orkestro (or: muzikistaro) ekludis, kaj la infanoj ekdancis. Li baldaŭ ekdormis.

Recenzo.

La Koboldo Ondra. De Jiri Maleš. El la moderna ĉsl. literaturo trad. E. Rondeto en Olomouc. Havebla ĉe Jar. Mastný, komercisto, Olomouc, Ĉeĥoslov.

Ferakonto kiu taŭgos por junuloj kiuj scias Esperanton. Bedaŭrinde la presprovaĵoj ne estis zorge kontrolitaj; sekve oni ne povas legi libreton sen konstanta haltado por trovi la signifon de ia kripliga vorto.

La Pesto en Milano dum 1630. "La Gefianĉoj," de A. Manzoni. Ĉapitroj 31 kaj 32, tradukitaj de Doktoro P. C. Monti. Havebla ĉe Paolet, S. Vito al Tagliamonte, Italujo.

Eble interesa kiel priskribi la tempo de timo kaj suspekto, sed ĉi tiu ne allogos la ordinaran leganton.

Jan Amos Komensky (Comenius) Boheme verkis D-ro Jan Novák. Tradukis "Rondeto de Esperantistinoj" en Praha. Prezo 5 Kč. Broŝuro priskribanta la vivon kaj laboron de Komensky, kiu, kiel skribis D-ro Stan Kamaryt en antaŭparolo "estas speciale kara koro de ĉiu Ĉeĥoslovako, ĉar li estas unu el la tri homoj kiuj plej esence reprezentas internan ideon de Ĉeĥoslovaka nacio."

S-ro Edgar H. Dawson, c/o Memorial Hospital, Hokitika, New Zealand (ĉi-jara), deziras korespondadi la ĝesamideanoj el ĉiuj landoj, leteroj kaj p.k. pri muziko kaj aliaj temoj. P.M. ne intersangos.

S-ro John Ten Eyck Hinkel deziras korespondadi per ilustritaj kartoĉoj 2520 Channing Way, Berkeley, California, U.S.A.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow." Cole's Monthly about Books

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor